

BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

Fondita en 1908.

OFICIALA ORGANO DE BELGA LIGO ESPERANTISTA

Aliĝinta al la Unuiĝo de la Belga Perioda Gazetaro

Fondintoj : L. CHAMPY, Fr. SCHOOFs, Am. VAN DER BIEST-ANDELHOF,
J. VAN LAERE, Oscar VAN SCHOOR.

Direktoro :

FRANS SCHOOFs, Kleine Hondstraat, 11

ANTVERPENo

Por la anoncoj oni sin turnu al:

H. PETIAU, St. Lievenslaan, 60, GENTo

Jara kotizo kun abono : Fr. 30,- — Eksterlando : Belgoj 6,-

ANTVERPENo

1932

ENHAVO. — Memoru pri « Panjo la Kaso ». — Repago de Kotizo 1932: Bela Premio. — XXIa Belga Kongreso de Esperanto. — La Jubileo de « La Verda Stelo ». — Du pensesprimoj de Chanakaya. — Al Antverpeno. — Interparolo. — Belga Kroniko. — Nia Familia Kroniko. — Por la Kaso de nia Ligo. — Teorio kaj Praktiko. — Grupa Kalendaro. — Esperanto inter la Aktuaroj. — La Limako. — Tragedio. — Bonhumoro. — Esperanto-Radio-Programo. — Diversaj Informoj. — Bibliografio.

BELGA LIGO ESPERANTISTA

Fondita en 1905.

Honora Prezidanto: **Princo Leopoldo, Duko de Brabanto.**

(Honora Prezidinto: formortinta Generalo Grafo Leman).

Estraro:

Prezidant^o pro honoro: A. J. Witteryck, Steenbrugge.

Prezidanto: Fr. Schoofs, Kl. Hondstr., 11, r. du Petit Chien, Antverpeno.

Vic-prezidantoj: L. Cogen, Dreef, 52, Drève, Ninove.

P. Kempeneers, r. aux Laines, 20, Wolstraat, Bruselo.

Gen. Sekretario: H. Petiau, St. Lievenslaan, 60, Bd. St. Liévin, Gento.

Kasisto: M. Jaumotte, Avenuo De Bruyn, 44, Antverpeno-Wilrijk.

Direktoro de la oficiala organo: F. Schoofs.

Komitato:

Konstantaj komitatanoj: Cam. Babilon, L. Champy, M. Elworthy-Posenaer,

Fr. Schoofs, W. Van der Biest, Osc. Van Schoor.

Delegitoj de la Grupoj:

AALST: Sekcio de B.L.E. — M. Van Wanseele.

ANTVERPENO: « La Verda Stelo », S. s. p. c. — M. Jaumotte, A. Faes.

BRUGO: Bruĝa Grupo Esperantista. Yv. Thooris, Ch. Poupeye.

BURSELO: Esperantista Brusela Grupo. — P. Kempeneers, F-ino Obozinski

CHARLEROI: Karloreĝa Grupo Esperantista. — A. Henraut.

CHENEE: « Grupo Esperantista » — F-ino L. Baiwir.

GENTO: Genta Grupo Esperantista. — H. Petiau, Cl. Van de Velde.

HASELTO: Haselta Grupo Esperantista. — Fr. Van Genechten.

KORTRIJK: Grupo Esperantista.

LIEGO: « Lieĝa Soc. por la Propagando de Esperanto ».

« Grupo Esperantista ». — Fern. Derigat.

LIERO: « Liera Stelo ». — Jos. Leflot.

LOKEREN: « Durma Stelo ». — A. Roels.

LOVENO: Grupo Esperantista. — R. De Keyser.

MEHLENO: Meklena Grupo Esperantista. — A. Baesens.

NEUWPOORT: Grupo Esperantista. — L. Braet.

SPA: Grupo Esperantista. — J. Desonay.

SCLESSIN-LIEGO: « Grupo Esperantista ». — René Dechesne.

THIENEN: Grupo Esperantista. — Ed. Dewolfs.

VERVIERS: Grupo Esperantista. — Jos. Hérion.

Juĝantaro pri profesora kapableco:

Efektivaj membroj: F-ino M. Jennen, L. Cogen, Cl. Vandeveld.

Anstataŭantoj: Oscar Van Schoor, A. Henraut, F. Mathieux.

Kandidatoj al la diplomo bonvolu sin anonci al la ĝenerala sekretario.

Gazetara Servo: F. Schoofs, Edg. De Coster.

Radio-fako: P. Kempeneers, Lod. Bas.

Kotizo: Fr. 30,— jare, inkluzive abono al « Belga Esperantisto ».

Poŝtĉeko: 1337,67 de Belga Ligo Esperantista.

Por la kroniko: la grupoj volu sendi al nia Ĝenerala Sekretario sian kon-
cizan raporton je la 15a de ĉiu monato, kun sia programo por la sekvonta
monato.

18-a JARO N-ro 1 (192)

JANUARO 1932.

BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

Oficiala organo de Belga Ligo Esperantista

Direktoro:

FRANS SCHOOFS

11, Kleine Hondstraat, Antverpeno

Telefono: 943.74

Abonpagoj kaj aliaj mensendo al

Poŝtĉeko No 1337.67

de

BELGA LIGO ESPERANTISTA

Konstantaj kunlaborantoj: M. JAUMOTTE, L. COGEN, W. DE SCHUTTER, S-ino L. FAES
H. PÉLIAU, F-ino R. SPIRA, S-ino J. VAN DER VEKEN, M. DE KETELAERE.

Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas.

La Redakcio konservas por si la rajton ĉorekti laŭbezone la manuskriptojn.

LA ESTRARO DE BELGA LIGO
ESPERANTISTA
plej korajn bondezirojn

MEMORU PRI "PANJO LA KASO"

La estraro de Belga Ligo Esperantista, inkluzive S-ro Schoofs, prezidanto kaj direktoro de nia organo, S-roj Cogen kaj Kempeneers, vicprezidantoj: S-ro Petiau, sekretario kaj mi mem, ĉi supre sendis al vi okaze de la Novjaro siajn plej korajn bondezirojn, kiujn ili intencas pliampleksigi, pensante samtempe al via tuta familio.

Ne ĉiam « Belga Esperantisto » N. 1 (Januaro) aperis ĝustatempe, por ke laŭ la kutimo, la estraro povu sendi al vi, per tiu ĉi vojo, siajn bondezirojn.

Kaj en tiu tempo oni plendis. Oni ofte akre plendis.

Neniu el la estraranoj pretendis, ke la plendintoj malpravas.

Sed nun, Karaj Geamikoj, estas alia afero. Belga Esperantisto de diversaj monatoj aperas en la unuaj tagoj de la monato, kies nomon ĝi portas.

Malgraŭ la konsiloj de via kasisto, la estraro al vi donis dum la jaro 1931 pli ol la membroj de « Belga Ligo » rajtas ricevi laŭ la pago, kiun ĝi postulas de ili. La estraro deziras, ke oni estu kontenta. Tial ĝi duoble laboris. Nun la organo materie vivas. Ĝi regule aperas.

Novjaro pasis. Pripensu do individue, ke nun estas la momento por la plendintoj kaj por la ne-plendintoj fari ankaŭ AKURATE sian devon.

Tiu devo konsistas por la izolaj membroj en la pago tuj al la poŝtĉekkonto de Belga Ligo N-ro 1337.67, de la kotizo de Fr. 30. Por la membroj de grupo, sama devo ekzistas. Ili pagu tuj al sia kasisto.

Sed por ili mi aldonas, ke ankaŭ estas ilia devo klopodi por ke tiuj, kiuj dum la estinta jaro ne jam aŭ ne plu pagis, aliĝu aŭ realiĝu. Nun ne plu

ekzistas iu kaŭzo por ne tuj fari sian devon. « Belga Esperantisto » vivas, ĝi eĉ vivas nunmomente pli lukse, pli amplekse ol sana administrado permesus.

Vi scias, ke en la presfako, la nombro de ekzempleroj plej multe gravas. Duobligo de la membraro permesus certigi firme la eldonon de bela, regula kaj riĉenhava revuo.

Ĉu ĉiuj, kiuj, eĉ en la periodo de ne-regula apero, pagis sian kotizon, ne deziros kunlabori, havigante al ni la abonon de unu plia membro de la Ligo aŭ de loka grupo.

Kaj flanke de tio, ni memorigas pri kolekto, kiun iniciatis la komitato de la Ligo, monkollekto favore de la eldonkaso de « Belga Esperantisto ».

Memoru pri ĝi... Memoru pri « Panjo la Kaso »!

LA KASISTO, *Maur. JAUMOTTE.*

REPAGO DE KOTIZO 1932

Bela Premio.

Ni insiste petas la abonantojn, ke ili repagu kiel eble plej frue sian kotizon 1932 al sia grupo aŭ al la poŝtĉekkonto 1337.67 de nia Ligo.

Tiuj, kiuj estos pagintaj antaŭ la 1^a de Marto ricevos belan premion. Tiu premio konsistas el 2 interesaj broŝuroj enhavantaj la faman artikolon « *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia* » de Unue kun tradukoj flandra-lingva de Willy De Schutter kaj franca-lingva de Maur. Jaumotte.

Ne forgesu do la daton: antaŭ la 1^a de Marto.

XXIa BELGA KONGRESO DE ESPERANTO

La Loka Kongresa Komitato de la nunjara Belga Kongreso donis jam en la lasta numero de 1931 ĝeneralan provizoran programon por la festoj de Pentokosto proksima.

Ĝis nun niaj Antverpenaj amikoj sin plej multe okupis pri la festoj, kiujn ili organizos en Januaro. Sed laŭ tio, kion ili esperas, ili povos jam doni pliajn informojn en nia numero de Februaro.

Tiel, kiel ĝi jam aspektas kaj kun la organiza talento, kiun havas la Antverpenaj gvidantoj, ni ne devas dubi, ke la Kongreso de Antverpeno estos granda sukceso. Tial ni ne atendu pliajn novaĵojn, kaj jam de nun sendu nian kotizon.

Al tiu ĉi numero estas aldonata aliĝilo, kun poŝtĉekpagilo.

Por plifaciligi la aranĝojn, sendu kiom eble plej rapide la unuan al S-ro Faes, sekretario de la Loka Kongresa Komitato, Schoenmarkt, 16/1, Marché-aux-Souliers Antverpeno, dum vi povas pagi al la poŝtĉekkonto N. 1119.10 de la XXIa Belga Kongreso de Esperanto, Avenuo de Bruyn, 44, Wilrijk, vian kotizon kaj viajn mendojn rilate al la kongreso.

B. L. E.

1907-LA JUBILEO DE "LA VERDA STELO"-1932

Bona novaĵo pri la jubileaj festoj de la Antverpena Grupo Esperantista « La VERDA STELO » estas la alveno de S-ro Jos. R. Scherer en tiu urbo, la 23an de Januaro proksima.

Ne plu necese estas, prezenti al niaj legantoj S-ron Scherer, kiu de multaj monatoj faros, laŭ iniciato de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-movado, rondvojaĝon ĉirkaŭ la mondo, ĉie parolante en kaj pri Esperanto.

S-ro Scherer, kiu estas unu el niaj plej bonaj paroladistoj esperantistaj, kaj kiu ordinare estas delegito de U.E.A. en Los Angeles, parolas pri diversaj temoj, elektotaj de la komitatoj de la grupoj, kiuj invitas. Li povas paroli pri liaj spertoj en la diversaj landoj, kiujn li vizitis. Tamen la festkomitato de « La Verda Stelo » kredis, ke pleje povus interesi parolado pri la lando mem en kiu loĝas kutime nia Samideano kaj kiu estas ankaŭ la lando, ne de la Verdaj Steloj, sed de la Filmaj Steloj.

S-ro Scherer do parolas agrable dum unu horo pri « Hollywood, la Film-Paradizo ».

Krom tio, la Festkomitato ankaŭ ludigos teatraĵeton, kiun ni nun ne devas priparoli, sed pri kiu ni diros iom pli multe en la sekvanta numero de nia organo.

Jen jam bona programo, sed tamen ne kompleta. Iom da muziko mankas. Kaj kelkaj membroj, konsentis zorgi pri malgranda koncerta parto.

Kiel ni jam antaŭe diris: Inter du partoj de la programo okazos Festkunsido, dum kiu oni memoros la Arĝentan Jubileon de la Grupo.

Ĉio ĉi supre klarigas, kial la organizantoj esperas, ke ĉiuj estos akurate je la 8a vespere, en la salono « Patria », Lge Leemstraat, 202, Lgue rue d'Argile.

Aldonu ni, ke la enirprezo por tiu ĉi Teatra kaj Muzikvespero, kun la Parolado de S-ro Scherer, kaj kun la enirraĵo al la Granda Dancfesto de dimanĉevespere (24an de Januaro) estas Fr. 15,—.

Krome la Dimanĉon je la 5a horo posttagmeze, okazos en la salonoj de la 1-a etaĝo de la sama salono « Patria », la jubilea Festeno, kiu kostas Fr. 35,— kaj al kiuj feliĉe jam multaj ankaŭ promesis partopreni.

La enskriboj povas esti sendataj kune kun la mono al la poŝtĉeknumero 1700.10, de la Prezidanto de la Festkomitato Maur. JAUMOTTE, Avenuo De Bruyn, 44, Wilrijk. Eventualaj korespondaĵoj, oni sendu al la sekretario Aug. Faes, Schoenmarkt, 16/1, Marché-aux-Souliers, Antverpeno.

Nun kompreneble la aliĝoj urĝas. Precipe por la festeno la organiza komitato devas nepre scii post malmultaj tagoj, kiom da partoprenantoj sin anoncas.

Dankon al ili en kaj ekster Antverpeno, kiuj jam sendis aliĝon aŭ ankoraŭ sendos.

LA FESTKOMITATO.

Du pensesprimoj de Chanakaya

(*Hindaj sentencoj*)

La situacio de reĝo neniam egalas tiun de saĝulo: la reĝo estas honorata nur en la lando kie li regnas; la saĝulo estas honorata ĉiuloke.

Oni igas al si favora avarulon oferante al li monon; kolerulon, preĝe kunigante la manojn antaŭ li; malsaĝulon, obeante liajn kapricojn; saĝulon, dirante al li la veron.

AL ANTVERPENO

KAREL LEDEGANCK (1)

Reĝin' de l'Skeldrivero,
Ho, restis en imag'
Belega tiu tag'!
Vi iris el murar' al ombro de l'somero,
Ornamis vin la festa vest',
Kaj rid' sur lip', gracia gest'.
Svarmanta l'amasig' de via infanaro
Aspektis dense kiel papilia aro
Diverskolora kaj ĝuanta pri l'aer'.
Mi diris: regas vin ankoraŭ ĝoj', sincer'!

Vespere en kvieto
Apud la Skeldobord',
Mi vidis en la Nord'
Spektaklon, kiun ne forgesas la poeto.
Rebrilis la arĝenta lun'
Majeste en ĉiellagun',
Sur la ebensupraj' de l'monda riverego,
Sur kiu lulis sin de mastoj arbarego,
Portintaj tien ĉi riĉecon de la mond',
Mi diris: lukson ĉiam naskas via ond'!

Kaj patrolingvan sonon
Ĉirkaŭe aŭdis mi.
En plena harmoni'
Al inda la aspekt' ĝi pruntis taktotonon.
Ĝi vive fluis kun facil',
Amat', el buŝ' de via fil'.
Poetanim' ĉe ĉiuj ŝajne rasdevenas,
Ĉu plum' penik' skulptil' al ili apartenas.
Figurlingvaj' kanttuŝis min. « En tiu part', »
Mi diris, « levas sin la sun' de l'flandra art'!

Ekformas kurbon, antaŭ
Forflu' de l'belga ter',
La flandra landriver',
Kaj tie kreskis algo kaj irido ĉirkaŭ
Vastega marĉo. Buf', serpent',
Nestadis tie, naŭza gent',
Jarcentojn kun en densa junk' loĝanta mevo.
Terpec' sin montris iam kiel en la revo:
Kabanon faris fiŝkaptist' sur tiu pec',
Kaj vivis protektata kontraŭ malsekec'. (2)

Kaj sur la sama tero,
Post jarcentoj for,
Sin levis urb' en glori'
Anstataŭ la kaban', kun turoj en fiero.
Kaj kiu nun en iu hor',
Iu popol' pro Di-favor'
Guadis, al ŝi fluis kiel grandaj benoj.
Amata estis ŝi pro siaj kronrubenoj
Ne depruntitaj, ŝi fidela la figur'
Nacia, propra frukt' de flandra la kultur'!

Anstataŭ Bruĝ', la sama
Eŭropa komercurb',
Kondukis ŝi, sen kurb',
Patrujon supren al reputacio fama.
De l'abundeco la akir'
La « Landjuvelo » (3) kaj turnir'
Atestis ŝian brilon. Burĝoj ja sen ĝeno,
Invitis monŝuldantajn reĝojn al festeno,
Kaj kiel rekompenc' por tiu la honor'
La ŝuldateston neniigis je pulvor'! (4)

Kuraĝon ekbruligis
La fajro de l'junec',
Kaj ŝi kun heroe'
Por lando en danĝer' la bruston ĉirkaŭigis.
Ho! Bela estis la vidaĵ'!
Mirinda ŝia heroaĵ'!
Ŝi kontraŭ fil' hispana, kontraŭ miloj sin defendis,
Kaj pro supera nombro, vivon kare vendis.
Remparojn longe bategadis soldatar'
Nur antaŭ ŝi akceptis pacon kun amar'. (5)

Ho! Kia granda ravo!
Admiru kiel ŝi
Perfidon, kun defi',
Subpremon de la Franco venĝis per la glavo.
Kuraĝo ŝia al renom'
Pensigas de l'antikva Rom'.
Burĝara virt' sufokis tiam, fort' terura,
Francujan iluzion en la sang' purpura,
Simila al furiozanta leonin',
Pro am' al la idar' defendegante ĝin. (6)

Sufiĉas batalaĵoj!
 La Senkomparulin',
 Laŭ paca origin',
 Pli fieregis pro animokaresaĵoj;
 Ŝi forĝis el l'eterna bel',
 Kreante el genia hel'
 Nepaliĝanta, brilradian glorkronon.
 La mond' admiris ŝian artimponon
 Respekte kaj prikantis plene je lirik'
 Naskejon noblan de la reĝoj de l'penik'!

Min trafis nun subite,
 La hela, brila bild'
 De tiu artogild'.
 Pro sankta emoci' mi tremis ja ekscite.
 Sin klini vidis kun admir'
 Mi ĉiujn antaŭ forta vir',
 Kun larĝa la ĉapelo, kiel antaŭ ĉefo.
 Kun agla la okul', figur' en reliefo,
 Rigardis supren li, en lumo de l'ĉiel'.
 Vivados lia nom' en senmorteca bel'! (7)

Ci tion, Skeldreĝino,
 Mi vidis en imag',
 En tiu bela tag',
 Dum ĝuis vi pri la natur' je l'sunoklino.
 Trovante min ĉe via bord'
 En dolĉ-revema koragord'.
 Mi aŭskultante, ĉar en lingva la kanzono
 De viaj filoj, sonis nefalsita tono.
 Belege staras via bild' en l'estintec'.
 Ĉu ĝi suferis de la temp' degenerec'?

Ho ne, vi restis rava
 Kun freŝa la mien',
 Konscia pri deven',
 Vi norda id' kun la triobla krono grava
 De fort', riĉec' kaj arttrezor'.
 Ne atentante pri favor'
 Donaca de fremdul', el propra ter' vi fosas
 Riĉaĵojn kaj la propran koron vi malslosas
 Por propra la feliĉo. Moroj, lingv', famec',
 Ankoraŭ ĉiam estas ja de flandra ec'.

Vi, kiel je antaŭe,
 Per fortikaĵ', rempar',
 De l'malamika ar'
 Minacas la potencon ĉiam hodiaŭe. (8)
 Mirige levas sin la tur',
 Giganta verk' de arta pur'
 Altpinta (9). Pezan ŝarĝon vi ankoraŭ portas
 De l'mondaj komercaĵoj, kiujn vi importas.
 Atestas via bors' pri la riĉeca ŝvel',
 Kaj viaj temploj ja pri multa artjuvel'!

Kaj kvazaŭ la leviĝo
 De la prosperosun',
 Ankoraŭ ĉiam nun
 Kreskigas belegecon, vi, per ĉirkaŭiĝo
 De multa tera paradiz'
 Ĝojigas ĉiujn kun surpriz'
 Per ĝu' de l'orient' (10). La kil' de l'Skeld' portata
 Vi, kvazaŭ estis ĝi dum ondo-fend' ĝenata,
 Trabatis vojon ĝis Germana riverreg'.
 Komerc' nun ŝvebas per vapora flugileg'.

Sed ne egalas dono
 De materia kar'
 La artoregnon, ĉar'
 Genia la spirit' valoras pli ol mono.
 Heredis via infanar'
 Donacon de la malavar'
 De l'granda Majstro kaj l'artista rond' grandiĝas.
 Lin ĉiam honorante ili mem gloriĝas.
 Ĉar nun fieras vi pri artgeneraci',
 Kaj la anim' de Rubens flamas ja en ĝi!

El la flandra trad. HECTOR VERMUYTEN.

- (1) Flandra poeto (1805—1847) kiu precipe famiĝis pro lia trilogio « La Tri Fratinaj Urboj (Antverpeno, Bruĝo, Gento).
- (2) La origino de la nomo « Antwerpen » estas popole klarigita laŭ la flandra vortoj « Hand » (mano) kaj « werpen » (ĵeti), ĉar iu giganto, loĝanta apud la Skeldo, dehakis la manon al la ŝipistoj, kiuj malobeis pagi al li imposton, por ĵeti tiun en la riveregon. Pli fidinda estas la etimologia klarigo laŭ « aen de werf » (ĉe la enŝipiĝejo).
- (3) Pri la landjuvelo aperos artikolo.
- (4) La Antverpenaj komercistoj pruntis milionojn al Karolo Va, Hendriko VIIIa, kaj Eduardo VIa. La poeto aludas pri la Florencano de Dozzi aŭ Dauchy, kiu nuligis gravan ŝuldon post vizito ĉe li de Karolo Va.
- (5) En 1585 Antverpeno pro malsato kapitulaciis al la Hispana militestro

Farnese post energia defendo de la urbestro Marnix van Sinte-Aldegonde, fama flandra prozisto.

- (6) Aludo al la malsukcesinta atako de la Duko de Alençon (Franca Furio) en 1583.
- (7) Rubens.
- (8) Dum la granda milito en 1914 la urbo suferis bombardadon de la Germana armeo.
- (9) La belega turo de la ĉefpreĝejo konstruita de 1352 ĝis 1518. Ĝi estas 123 metrojn alta.
- (10) Parkoj kaj ĝardenoj en kaj ĉirkaŭ la urbo.

INTERPAROLO

Nek Jungfraŭ nek Finsteraarhorn estas surpaŝitaj de homo

La supro de l'Alpoj... Katenego de krutaĵoj... ĝuste la mezo de la montaro. Super la montoj estas pale verda, hela, muta ĉielo. Forta, akra frosto; malmola briletanta neĝo; el sub la neĝo vidiĝas severaj ŝtonegoj de glaciiginta, ventumita rokaro.

Du grandegaĵoj, du gigantoj altiĝas ambaŭflanke de l'ĉielkupolo: Jungfraŭ kaj Finsteraarhorn.

Kaj Jungfraŭ diras al sia najbaro:

— Ĉu estas io nova? Ĉi vidas pli bone. Kio estas tie malsupre?

Pasas kelkaj jarmiloj — unu minuto — kaj Finsteraarhorn responde bruegas:

— Densaj nuboj superkovras la teron... Atendu.

Pasas ankoraŭ jarmiloj — unu minuto.

— Nu, kaj nune? demandas Jungfraŭ.

— Nun mi vidas; tie, malsupre, ĉiam la samon: Multkolora. Bluj akvoj; nigraj arbaroj; grizaj ŝtonamasoj. Apude ankoraŭ ĉiam svarmas etaĵoj. Ĉu ci scias tiuj dupieduletoj, kiuj neniam ankoraŭ povis malpurigi min kaj cin?

— Homoj?

— Jes, homoj.

Pasas miljaroj — unu minuto.

— Nu, kaj nune? demandas Jungfraŭ?

— Kvazaŭ estas malpli multaj etaĵoj — tondras Finsteraarhorn — pliklariĝis tie sube. Mallarĝiĝis la akvoj, maldensiĝis la arbaroj.

Pasis ankoraŭ jarmiloj: unu minuto.

— Kion ci vidas? diras Jungfraŭ.

— Apud ni la proksimo kvazaŭ puriĝis, respondas Finsteraarhorn; nu kaj tie malproksime, en la valoj estas ankoraŭ makuloj kaj io moviĝas.

— Kaj nun? demandas Jungfraŭ post aliaj jarmiloj — unu minuto.

— Nun estas bone, respondas Finsteraarhorn; ĉie estas pure, tute blanke, kien ajn mi rigardas. Ĉie estas nia neĝo-glata neĝo kaj glacio. Ĉio rigidiĝis. Bone estas nun, trankvile.

— Bone, diris Jungfraŭ. Cetere, ni sufiĉe babilis, maljunulo. Ni dormetu, jam estas tempo.

La montegoj dormas. Dormas hela, verda la ĉielo super la tero, por ĉiam eksilentinta.

Februaro 1878.

El « Versaĵoj en Prozo » de J. TURGENEV. — Tradukis L. Harlamb.

Nederlandsche Gist- & Spiritusfabriek

(Nederlanda Fabriko de Fermento kaj Alkoholo)

ANONIMA SOCIETO

Societa Sidejo: **DELFT** (Nederlando)

Fabrikejo: **BRUGES-BASSINS** (Belgujo)

Filioj: **BRUSELO kaj HUY** (Belgujo)

Produktaĵoj:

Reĝa Fermento

Alkoholo kaj Brando

Eldistilaj Rekrementoj

Fako "Fermento kaj Rekrementoj": Bruges-Bassins

Fako "Alkoholo kaj Brando": 378, Av. Van Volxem, Bruselo

Telefona: { Bruges N° 8 & 908
Bruxell. BR 37.83.38
Huy N° 40 } { Bruxelles
Bruges
Huy } "Gistfabriek"

S.D. (104)

Por rapide transformi la « vortojn » en « skribon »,

por ke la « pensoj » iĝu « agoj »

por plej efike uzi vian tempon,

por havigi al vi pli multe da tempo

diktu per la

" DICTAPHONE "

(Reg. U. S. Pat. Off.)

KAJ DUOBLIGU TIAMANIERE VIAN POVON

AKIRI FARITAĴOJN.

La " DICTAPHONE " estas aparato plej simpla.

— Dokumentiga broŝuro sendata laŭ peto. —

Robert CLAESEN

GENERALA AGENTO

40, rue de Loxum, BRUXELLES

Telefono 11.06.82

BELGA KRONIKO

ANTVERPENŲ. — " La Verda Stelo ". — Sabaton la 28an de Novembro, S-ro W. De Schutter, gazetara sekretario de la grupo, faris interesan paroladon kun lumbildoj, en kiu li komparis la du ekspoziciojn, kiujn li vizitis de Antverpeno (1930) kaj de Parizo (1931). Li speciale atentigis la membrojn pri tiu foiro, kiun la plejmulto ne vizitis, tiun en la franca ĉefurbo. Li post sia parolado estis longe aplaŭdata. S-ro Jaumotte dankis kore kaj aldonis kelkajn vortojn en kiu li faris novan paralelon, viditan laŭ alia angulo, kaj kiu necesigis novan aldonon de S-ro De Schutter. Bonega vespero.

La 5an de Decembro okazis dancfestoj, kiu iĝis bela sukceso.

La 12an de Decembro Zamenhoffestoj kaj diplomdisdono. S-ro Jaumotte honorigis per mallonga parolado la memoron de nia Majstro, kies ideojn homamajn kaj pacemajn li substrekis, kaj poste bonvenigis, gratulis kaj konsilis la kvin diplomitojn de la kurso de S-ro Boffejon, kiu kiel profesoro ankaŭ meritas specialajn gratulojn. S-ro Schoofs, memorigis, okaze de la Zamenhoffestoj, pri la Monumento kaj la brikoj, kiujn la Esperantistoj devas aĉeti por ĝin konstruigi, kaj kiel Prezidanto de la juĝantaro alparolis ankaŭ la lernintojn. S-ro Faes, sekretario legis la nomojn de la diplomitoj: F-ino Sokalska, kun plej granda merito; F-ino José Van Eynde, S-roj Eug. Peeters kaj. Kar. Styleman, kun granda merito, kaj S-ro Vikt. Visser, kun merito. Agrabla dancado formis bela fino por tiu ĉi festo.

La 19an de Decembro okazis la ĝenerala monata kunsido, S-ro Jaumotte prezidanto, altiris la atenton pri la festoj, dum kiuj oni memorigis la fondiĝon de la grupo kaj gratulos la jubileantojn, inter kiuj precipe S-ro Schoofs, la fondinto de la grupo. Li faris ankaŭ alvokon por la nova kurso, kiu komen- ciĝos la unuan Merkredon de Januaro.

La 26an de Decembro, duan Kristnasktagon, la membroj, ĉirkaŭ bela Krist- naskarbo, forlotis la belajn kaj amuzajn premiojn, kiujn ĉiuj ĉeestantoj alportis. Kompreneble la elpakado de la surprizoj pleje amuzigis. Intima dancado sekvis.

En la Esperanto-kurso, organizata de la Urbestro en la plano de la oficialaj vesperkursoj, partoprenas 11 lernantoj. La kurso estas gvidata de S-ro Constant Schroevers.

ALOSTO. — B.L.E. Sekcio Aalst-Alost. — Nia grupo regule ĉiun jaŭdon kunvenas en nia ejo « Belgisch Hof » Granda Placo. Tuj antaŭ la kunvenoj nia Prezidanto, S-ro Kapitano Van Wanseele donas esperantan lecionon. La 20an de novembro nia Prezidanto faris tre interesan paroladon kun lumbildoj pri la Skotaj montoj.

BRUGO. — " Bruĝa Grupo Esperantista ". — La 17an de Nov. okazis koresponda vespero kun Radio-aŭskultantoj; alvenis 24 leteroj el tri diversaj landoj. La 24an de Nov. la membroj ekzercigis gramatike, traduke kaj elparole. Intima kunveno estis la 1-an de Dec. La 8an de Dec. okazis kanta vespero en la sidejo « Cornet d'Or », sub la gvidado de F-ino Boereboom, kiun kun- helpis la akompanistino F-ino Weissenborn.

BRUSELO. — “**Esperantista Brusela Grupo**”. — La 7an de Decembro oni parolis pri la Festo de la Esperanto-libro en 1931. Poste okazis prezentado de la teatraĵo «*La Postulema Pentristo*» de Tristan Bernard. Partoprenis la provludon: F-inoj Obozinski, Lacourt, La Haye, S-roj Castel, Debel, Kempeneers, La Haye kaj Lavissee. D-ro Van der Biest gvidis kaj donis klarigojn al la ĉeestantaro.

La 14an, ĉar la parolado de D-ro Kempeneers (Pri la Societo de la Nacioj) ne povis okazi, oni diskutis pri la regularo de la Grupo kaj pri propagandaj rimedoj.

La 21an okazis la ĝenerala kunsido kaj la 28an F-ino Obozinski legis la projekton de nova biblioteka regularo. Poste S-ino Staes legis raporton pri la libro «*Trapafita Dekreto*» (tradukita de Nikeler el la ukraina lingvo) kaj S-ro Debel pri verketo de S-ro Jirkov «*Kial venkis Esperanto*». F-ino Obozinski donis novan pruvon de sia bonkoreco kaj malavareco disdonante sukerajojn.

CHARLEROI. — La 19an de Decembro S-ro Fr. Schoofs estis invitita de la «*Rotari-Klubo*» de Charleroi por paroladi pri Esperanto. Preskaŭ ĉiuj membroj de la klubo ĉeestis. Post la kutima simpla tagmanĝo nia samideano prezentis nian lingvon kaj klarigis la praktikan uzadon, kiu jam nun ekzistas en la mondo. La pledado poresperanta altgrade interesis la rotarianojn, ĉar post la dankvortoj de la prezidanto al la parolinto, komenciĝis diskutado, kiu daŭris pli ol unu horo. Diversaj ĉeestantoj petis pliajn klarigojn aŭ prezentis kontraŭargumentojn, kiujn ĉiuj niaj propagandistoj aŭdas jam de multaj jaroj, kaj kiuj estis preskaŭ ĉiuj glatigitaj de... aliaj ĉeestantoj neesperantistaj. La aranĝo de tiu elmontraro de Esperanto sendube havos bonajn fruktojn en la industria regiono de Charleroi kaj en la rotariaj medioj en la tuta lando. Ni ja kredas scii, ke la klubo de Charleroi esprimis la deziron, ke la aliaj belgaj Rotariosocietoj ankaŭ organizu paroladon pri nia lingvo, ĉar ĝi estas konvinkita pri la utileco de nia movado por la celoj de la internacia Rotario.

HASELTO. — “**Haselta Grupo Esperantista**”. — La Esperanto-kursoj gvidataj de S-ro Pr. Van Genechten ĉiam bone progresas. Ili finos verŝajne je la mezo de Februaro estonta. La novaj elementoj venontaj el tiuj kursoj sendube alportos freŝan bonan sangon por la pli-vigligo de la grupo.

GRAVE! — La dana registaro farigis belan filmon pri sia lando kun nur Esperanto-teksto. Belga Ligo Esperantista interkonsentis pri la montrado de ĝi en Belgujo. La filmo nun alvenis en nia lando. La grupoj, kiuj deziras organizi montradon en sia urbo, sin turnu al nia ĝenerala sekretario.

SE VI VOLAS VARBI

Ne forgesu, ke vi devas posedi la necesan materialon:

En franca lingvo:

En flandra lingvo:

Initiation à l'Esperanto
Premier Manuel.

Inleiding tot Esperanto
Leerboekje.

MENDU ĈE BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, ANTVERPEN

NIA FAMILIA KRONIKO

GRATULOJ

Al S-ro **Léon Coucke**, ano de la Bruĝa Grupo, kaj al lia filino Madeleine, al kiu naskiĝis filineto, Jeanne De Smedt, la 11an de Novembro.

Al Gesinjoroj **W. Lepeer**, el Bruselo, al kiuj naskiĝis fileto, Raymond, en Novembro 1931.

Al S-ro **Puskàs István**, el Budapeŝto, vizitinto de kelkaj el niaj grupoj en Belgujo, kiu edziĝis la 22an de Novembro kun F-ino Aczél Ilona.

Al Gesinjoroj **Ch. Poupeye-Hinderyckx**, el Bruĝo, al kiuj naskiĝis fileto, Karel, la 14an de Decembro 1931.

Al Gesinjoroj **Willem De Koning**, el Antverpeno, kies filo Willem edziĝis la 30an de Decembro kun F-ino Irma Janssens.

NEKROLOGO

La 23an de Decembro 1931 mortis en Antverpeno S-ro **Auguste Snieders**, malnova Esperantisto kaj membro de «*La Verda Stelo*». Li estis iom malpli ol 63-jara. Ni prezentas al la familio funebranta niajn korajn kondolencojn.

POR LA KASO DE NIA LIGO

La ekzemplo montrita per la publikigo de nia unua listo de mondonacoj ricevis bonan akcepton ĉe multaj aliaj el niaj amikoj.

Ĉi sube ni donas la duan liston:

Anonima	Fr. 250,—	S-ro Debel	Fr. 5,—
Anonima	» 150,—	F-ino E. La Haye	» 20,—
F. Swinne	» 5,—	S-ino Hart J.	» 5,—
I. Spielfiedel	» 10,—	E. André	» 5,—
J. kaj E. Lahaye	» 10,—	J. Opal	» 5,—
Sennomulo	» 5,—	Ges-roj Lavissee	» 10,—
J. Huysmans	» 10,—		
F. Staes (2a pago)	» 5,—		Fr. 500,—
S. Obozinski (2a pago)	» 5,—		

La movo estas bona! Aliaj geamikoj sendube sekvos ĝin. La kaso ilin atendas. Ili sendu sian donacon al poŝtĉeknumero 1337.67 de Belga Ligo Esperantista.

Teorio kaj Praktiko

La lernantoj estis ekzamenataj pri persona higieno. Oni demandis al knabo: «*Kion vi devas fari por havi dentojn blankajn kaj sanajn?*» «*Lavi ilin*», estis la rapida respondo. «*Kiam vi devas lavi ilin?*» «*Je mateno, tagmezo kaj nokto.*» «*Per kio oni devas lavi ilin?*» «*Per dentbroso.*» «*Tre bone; ĉu vi havas dentbroson?*» «*Ne, sinjoro.*» «*Ĉu via patro havas dentbroson?*» «*Ne, Sinjoro.*» «*Ĉu via patrino havas dentbroson?*» «*Ne, Sinjoro.*» «*Sed kiel vi scias la uzadon de dentbrosoj?*» «*Ni vendas ilin, Sinjoro.*»

GRUPA KALENDARO

ANTVERPEN. — **“La Verda Stelo”**. — Kunveno
« De Witte Leeuw », Frankrijklei, 4, avenue de France : ĉi-
sabate, 21 h. — Kantlernado de 20-21 h. en la sekretariejo :
Schoenmarkt, 16/1, Marché-aux-Souliers.

- 9 Jan. : Diskutvespero : Temo : « Por kaj kontraŭ Esperanto ».
16 Jan. : Diplomdisdono al la lernintoj el la kurso de S-ro L. De Hondt.
20 Jan. : 20a h. Malfermo de nova kurso de Esperanto en la instruejo België-
lei, 99, Avenue de Belgique.
23 Jan. : *Jubileaj festoj* : 20a h. Festvespero en salono « Patria », Lange Leem-
straat, 122, Longue rue d'Argile. Parolado Scherer kun lumbildoj.
24 Jan. : Jubileaj festoj : 17a h. Jubilea festeno ; 20a h. Dancfestoj, en la sama
salono « Patria ». Pri aliĝo vidu apartan komunikon.
30 Jan. : Jara ĝenerala kunsido de la grupo. Raporto de la sekretario kaj de la
kasisto pri la pasinta jaro 1931.
6 Febr. : Karnavala Balo.
13 Febr. : Parolado de S-ro H. Boffejon.
20 Febr. : Prezento de la Antverpena Pulĉinela Kelo.
27 Febr. : Gramofon-koncerto en la magazeno Aug. Faes, Schoenmarkt 16/1.

AALST. — **“B.L.E. Sekcio Aalst-Alost”**.

Je mezo de januaro okazos parolado de S-ro D-ro Kempeneers vic-prezidanto
de la B.L.E. pri la Ligo de Nacioj. — Bela kolekto da « cinescope » bildoj
estos montrata.

La loka sekcio de la Belga Unio por la Ligo de Nacioj interesiĝas pri tiu
parolado.

BRUSELO. — **“Esperantista Brusela Grupo”**. — Kun-
veno : « Brasserie du Sac », Granda Placo, 4, ĉiulunde je la
20.30a h.

- 4 Jan. : S-ro Swinne parolos « Pri Sukeraĵoj » (kun disdono de specimenoj).
11 Jan. : S-ro De Kegel donos lecionon de Esperanto. Poste, amuza vespero.
14 Jan. : S-ro D-ro Kempeneers parolos « Pri Skotaj Montoj » (kun lum-
bildoj), en la Urbdomo de Jette.
18 Jan. : S-ro D-ro Kempeneers parolos pri « Esperanto kaj la Societo de
la Nacioj ».
25 Jan. : Ĝenerala kunsido. Propagandaj rimedoj. Legado de « Mateo
Falcone », tradukita de Borel.

Pri la programo de la 11a de Januaro 1932 : Ni faras alvokon al ĉiuj niaj
gesamideanoj, por ke ili alvenigu al tiu provleciono, siajn parencojn, amikojn,
konatulojn kaj precipe multajn neesperantistajn personojn. Tiu demonstracio
de nia lingvo, estos sprita, gaja kaj interesplena. Ĝi estos bonega propaganda
elmonro, al kiu ni invitas ĉiujn personojn, kiuj deziras havigi al si klaran
ideon pri Esperanto.

BRUGO. — **“Bruga Grupo Esperantista”**. — Kunven-
ejo : « Oud Brugge » ; ĉiumarde, 20 h.

- 3 Jan. : Je la 16a en sidejo « Gouden Hoorn — Cornet d'Or » : Jara festo
de la teatra sekcio kun dancado.
5 Jan. : Je la 20a kunveno en « Oud Brugge — Vieux Bruges ».
Je la 20a 1/2, en sidejo « Gouden Hoorn — Cornet d'Or » : Kanta vespero.
Prezido : F-ino Boereboom. (Oni ne forgesu tekstaron.)
8 Jan. : Je la 20a en sidejo « Gouden Hoorn — Cornet d'Or » : Malfermo de
nova kurso por komencantoj, kaj unua leciono sub gvidado de S-ro Ch.
Poupeye. (La sekvantaj lecionoj okazos la 15an, 22an kaj 29an de januaro.)
Pliaj kunvenoj je la 20a en « Oud Brugge — Vieux Bruges » :
12 Jan. : Deklama vespero, sub prezido de S-ro G. E. Guillaume. (Ĉiu
membro deklamas ion laŭ sia plaĉo.)
19 Jan. : Parolado de S-ro Fernand Roose, pri « Tutabstinencula Movado »,
kaj posta pridiskuto sub prezido de S-ro Ch. Poupeye.
26 Jan. : Ĉiujara ĝenerala kunveno sub prez. de F-ino Y. Thooris. Morala
raporto de la Prezidantino. Raporto pri la grupa agado de la Sekretario. Financa
raporto de la Kasisto. Pridiskutado kaj diversaj proponoj.

ESPERANTO INTER LA AKTUAROJ

Niaj legantoj memoros pri nia siatempa informo pri la intereso al Esperanto
inter la aktuaroj (asekur-matematikistoj). La Konstanta Komitato de l'Inter-
naciaj Kongresoj de l'Aktuaroj en Bruselo sendis al la Universala Kongreso
de Esperanto en Budapeŝto sian vicprezidanton D-ro Sós Ernő, Budapeŝto, kiel
observanton. D-ro Sós poste publikigis tre favoran, riĉe dokumentitan raporton
pri siaj impresoj en la oficiala bulteno de tiu ĉi organizacio. La ICK en
Genevo kune kun la Belga Ligo Esperantista preparis specialan propagandon
por nia lingvo en la nomita organizacio.

Sekve de decido de la Aktuar-Kongreso en Stockholmo en 1930 D-ro Sós
iniciatis la aperigon de provo de esperanto-vortaro por aktuaroj. Tia vortaro
ĵus aperis sub la titolo « Dictionnaire actuariel » (Versicherungstechnisches
Wörterbuch — Actuarial Dictionary) kaj enhavas 200 fakvortojn en Esperanto,
angla, franca kaj germana lingvoj. Ĝi estas kompilita de D-ro Sós sub la
kunhelpo de sinjoroj P. Balkányi kaj Ch. Goldziher en Budapeŝto kaj aparte
prilaborita de S-ro Robert Kreuz, direktoro de I.C.K. kaj membro de la
Lingva Komitato en Genevo.

Fakuloj kaj interesitoj en la asekur-matematika kampo povos ricevi rilatajn
informojn pri la laboro de la nomita kongreso de : Konstanta Komitato de la
Internaciaj Kongresoj de l'Aktuaroj, S-ro Am. Bignault, Prezidanto, 13, rue
du Congrès, Bruxelles (Belgujo) aŭ de D-ro Sós Ernő, vicprezidanto, Andrassy-
út, 40, II, Budapeŝto (Hungarlando).

Gazet. Kom. I.C.K.

NE DAŬRIGU VIAN LEGADON

ANTAŬ OL

VI ESTAS PAGINTA

VIAN KOTIZON

POR 1932

AL

Belga Ligo Esperantista

Poŝtĉeko N-ro 1337.67

aŭ al la

KASISTO DE VIA LOKO GRUPO.

—
—

Faciligan al ni nian laboron

administran kaj propagandan!

—
—

LA LIMAKO

Patrino forestas la tutan tagon. Ŝi foriris hodiaŭ mateŭne kun multe da sinjoroj kaj sinjorinoj en granda veturilo: S-ro de Veler kondukis, kaj S-ro de Thilanges blovis en grandan trumpeton. Estis tre bele. Kompreneble Trott restas hejme. Li estas tro malgranda. Oni petis Miss, ke ŝi venu kaj pasigu la tagon kun li por ke li ne enuiĝu. Trott estus preferinta resti sola kun Jane, sed oni ne petis al li lian opinionon.

Miss sidas sur benko, malantaŭe en la ĝardeno. Ŝi legas anglan libron. Ŝiaj okulvitroj regas ŝian imponan nazon. Neniu muskolo de ŝia vizaĝo tremetas. Ŝi turnas la paĝojn laŭ aŭtomata reguleco. Trott provis fari multajn aferojn; sed nenio lin tre amuzas. Fine, li iras al sia malgranda ĝardeno por ĝin inspekti. Ĝi estas iom malorda, tiu ĝardeno. Kuŝas tie miksaĵo de ŝtonetoj, de fruktoŝeloj, de herbaĵoj kaj de ĉiuspecaj ligneroj, kiu ne igas ĝian aspekton alloga. Sed tamen ĝi estas bela, dank' al la rozujo, kiu kreskas en ĝia mezo. Tiun rozujon Trott ne plantis; ĝi estas belega; kelkfoje kreskas rozoj sur ĝi. Kaj ĵus hodiaŭ estas unu tute disvolviĝinta. Trott ĝin ĉiufanke admiras kun fiero kaj ravo. Ĝi estas vere bela, tiu rozo...

Subite la okuloj de Trott rondiĝas kaj streĉe fiksiĝas. Li staras kun larĝe malfermita buŝo kaj iĝas tute ruĝa. Kio estas tio? Jen abomenaĵo. Sur la rozo estas limako, kiu promenadas, malbela limako, kiu lasas malantaŭ si saliva postsigno. Ĝi turnas la kapon dekstren, maldekstren, tiras siajn kornojn, streĉas ilin... Ĝi ne ĝenas sin, vere!

Trott dum momento ĝin ekzamenas, tiam li vokas per tranĉa voĉo:

— Ho! Miss, venu vidi!

Miss levas sian grandan nazon super sia libro. Ŝi metas la libron sub la brakon kaj post kvar paŝegoj ŝi staras apud Trott.

— Kio estas?

Trott naŭze montras per la fingro. Li abomenas tiujn bestojn.

Miss mallevas sian rigardon kaj fikse rigardas la limakon.

— Estas limako.

Trott supozis tion.

— Tiu molusko malutilas la vegetaĵojn; vi rajtas detrui ĝin.

Trott estas kortuŝita pro tiu permeso, sed li vere naŭzas kapti la beston.

— Miss, ĉu vi ne volas preni ĝin?

Miss lin rigardas severe:

— Kial mi ĝin prenu kaj ne vi? Ĝi estas sur via propraĵo. Estas via devo, defendi vian propraĵon.

Trott sopiras. Li scias ke, kiam Miss estas parolinta, ne utilas insisti. Li streĉas la manon, ĝin retiras... Fine li metas la fingron sur la konkon. Kiu ŝanco!... La limako ektimis. Ĝi tute kuntiriĝis en sian dometon. Nenio plu okazas. Trott spiras pli libere. Sed, estas egale, li ne ŝatas tiujn bestojn, ne, vere, tute ne. Kion li nun faros? Ha! kiu bona ideo! li ĵetos ĝin trans la muro en la ĝardenon de Sinjorino Ducrieux. Trott pretigas sian brakon malantaŭe...

Sed Miss ĝin ekkaptas. Ŝi diras solene:

— Estas malpermesate akiri vian feliĉon per la malfeliĉo de alia. Tiu molusko manĝus la kreskaĵojn de la najbarino. Estas maljuste, ke vi ĵetu ĝin en ŝian ĝardenon.

— Kion mi devas do fari?

Miss diras:

— Dispremu ĝin sub via piedo.

Trott rigardadas la limakon sendecide. Ĝin dispremi sub sia piedo? Fi! Nur la ideo aŭdi la krakon de la konko, tiam senti sub sia plando la molan karnon de la besto, doloras al li la koron. Oni povus ĝin mortigi alimaniere: ekzemple, ĵeti ĝin en la puton. Jes, tio estus pli bona.

Trott preparas sin por efektiviĝi sian ideon. Tamen li ne estas kontenta. Ĉion bone konsiderinte, la kompatinda limako ne faris ion tre malbonan. Ĉu ne estas senkore ĝin tiel mortigi? Ĝi promenis tute trankvile kaj eble tre ĝojis tiel promenante kaj manĝante sur la bela rozujo, sub la bela suno. Jes, sed ĝi difektis ĝin. Ĝi manĝis ĝin. Ĝi estas punota. Nu! kial do ĝin puni? estas ja necese, ke ĝi manĝu, ankaŭ ĝi. Ĝi manĝas kion ĝi povas. Ne por difekti la rozon, pro malboneco, ĝi rampis sur ĝi; estis pro tio, ke ĝi malsatis, ĉar ĝi bezonis ĝin por sin nutri. Ĉu vere oni devas ĝin mortigi pro tio?

Nu! Ĉu oni ne mortigas la bovojn, kaj la ŝafojn, kaj la bovidojn, kaj la malfeliĉajn malgrandajn ŝafidojn, kiuj blekas tre malgaje, kaj la belajn birdojn de la arbaroj, kiuj fajfas tiel ĝojajn kantojn? Ili estas pli interesaj ol limako kaj ne pli malbonaj ol ĝi. Tamen oni ilin ja mortigas. Do!... Trott levas la brakon por malsuprenĵeti la limakon... Sed li dolĉe retiras ĝin. Lia mano ĉiam tenas la konkon.

Jes, estas vere, oni mortigas tiujn bestojn. Sed estas por ilin manĝi, ĉar oni bezonas ilin. Sen tio, estas malbone, ilin mortigi. Trott rememoras, ke iam lia patro tiris la orelojn al malbona knabo, kiu mortigis birdon per ŝtono. Li tre koleris, la patro! Kaj tamen la birdoj manĝas la fruktojn; la bovoj kaj la ŝafoj sin paŝtas el herbo kaj belaj floroj. Trott vidis antaŭ nelonge bovinon elŝiri almenaŭ kvindek lekantetojn per unu dentotranĉo. Malgraŭ tio estus estinta tre malbone ŝin mortigi kaj la limako ne estas pli kulpa ol ŝi.

Provante solvi tiujn problemojn, Trott sentas sin tre malfeliĉa. Li ekŝatas plori. Nun ŝajnas al li, ke li grave pekus, se li oferbuĉus la limakon je sia kolero. Kaj tamen, vere, ne, li ne povas permesi, ke tiu malbela besto difektas kaj dispecigas liajn florojn. Kion fari? Li turmentas al si la cerbon.

Rezonadoj krude skiziĝas en lia kapo. Estas malbone mortigi limakon, sed...

Li streĉe rigardas la beston per timoplenaj okuloj. Ne, vere, estas neeble. De malproksime Miss lin observas moke. Ŝi metis sian libron sur la genuojn kaj ŝiaj suprenfalditaj lipoj malkovras la restaĵojn de malnova domenaro. Ŝi ridetas pro la hezitoj de Trott. Kiel tio finiĝos?

Subite Miss leviĝas kvazaŭ oni estus ie pikinta ŝin per pinglo. Ŝi eligas akran krion kaj alkuras, glitigante teren la karan libron.

Kio okazis? Per movo rapida, preciza kaj neatendita, Trott puŝis la limakon en la fundon de la gorĝo, kaj, fermante la okulojn, li ĝin englutis.

— Ho! Trott! *for shame!* kiel vi povis! kiel malsane! *naughty boy!* kiel abomene!

RADIO

DISKOJ

GRAMOFONOJ

LA VOĈO DE SIA MASTRO

La Marko tutmonde konata

pro la perfekteco

de siaj produktoj



GRAMOFONDISKO

kun: "LA ESPERO"

himno Esperantista ludita

de granda orkestro

kaj: "LA BILD-ARIO"

el « La Sorĉa Fluto » de Mozart

en Esperanto kantita

PREZO Fr.: 35,-- afrankite

Mendu ĉe **Belga Esperanto-Instituto K. S., Kl. Hondstraat, 11**

Poŝtĉeko 1689,58

ANTVERPENO.

kaj: Muzikvendejo GUSTAVE FAES, Schoenmarkt, 16/1, Antverpeno

Belga Antologio

2 GRANDFORMATAJ VOLUMOJ: 600 PAĜOJ

Flandra Parto

Franca Parto

Kompilita kaj
kun literatura resumo
de

H. VERMUYTEN

Kompilita kaj
kun literatura resumo
de

M. JAUMOTTE

PREZO: FR. 40,—

Mendu ĉe **BELGA ESPERANTO-INSTITUTO K. S.**

11, KLEINE HONDSTRAAT, ANTVERPENO

Poŝtĉeko: 1689.58

VIZITU BRUGES (BELGUJO)

arta urbo je 15 Km. de la Norda Maro

kaj haltu:

HOTEL DU CORNET D'OR

2, PLACE SIMON STEVIN

Sidejo de la Bruĝa Grupo Esperantista.

Centra situacio je 2 minutoj de la Stacidomo.

Tre komfortaj ĉambroj, bonaj manĝaĵoj, bonaj vinoj kaj tre

moderaj prezoj.

Oni parolas Esperanton.

English spoken.

(106) S. D.

REKOMENDATAJ HOTELOJ

ANTVERPENO:

De Witte Leeuw, 4 Frankrijklei. Tel.: 373.21.

Monopole, Statiestraat, 21. Tel.: 267.15.

Progrès, De Keyserlei, 61. Tel.: 353.81.

Roi Albert, Place de la Gare, 44. Tel.: 217.60.

BRUSELO:

Brasserie du Sac, Grand'Place, 4. Tel.: 12.62.25.

Hôtel des Négociants, rue de la Fourche, 17. Tel.: 12.69.23 & 11.08.44.

Hôtel de l'Espérance, Pl. de la Constitution 14. Tel. 11.27.91.

Grand Hôtel G. Scheers, Boul. Adolphe Max. Tel. 17.77.60 ĝis 62.

Grand Hôtel des Colonies, rue des Croisades 2. Tel.: 17.00.94.

GENTO:

Hôtel de l'Yser, 65 Flandra strato. Tel.: 110.91.

Hôtel Terminus, Placo Marie Henriette. Tel. 110.45.

NINOVE:

Hôtel de l'Etoile, Place de la Station. Tel.: 19.

SAMIDEANOJ! KURAĜIGU ESPERANTISTAJN FIRMOJN!

Por via somera ripozloko apud Marbordo, elektu:

LE GRAND HOTEL D'OOSTDUINKERKE

(Korespondas per Esperanto. — Parolas Esperante),

AGRABLA RESTADO DUM TUTA JARO

BONAJ MANĜAĴOJ. BONAJ VINOJ. TRE MODERAJ PREZOJ.

Generala agentejo por venda de Francaj vinoj, oleoj,
Skribu al S-ro BENOIT, Grand Hôtel d'Oostduinkerke.

El ĉiuj enspezoj farataj pere de Esperanto, S-ro Benoît dediĉos parton
de 5 % al la propaganda kaso de « Belga Esperantisto ».

Konfuzaj kaj poliglota silaboj interpuŝiĝas sur ŝiaj lipoj.

Trott igas pasi la fulmotondron kviete. Li pli multe okupas sin pri tio, kio okazas en lia interno. Li iom maltrankviliĝas pro sia stomako. Strange bruas; sendube la limako promenas. Tiu ideo iom naŭzigas lin.

Sed ne. Estas finite. Ĝi certe estas jam digestita. Tiam Trott reiras al sia ĝardeno; li rigardas la rozon kun duobla amo kaj sentas sin fiera pro tio, ke li defendis ĝian belecon ne detruinte senutile la vivon de ĝia humila atakanto.

André LICHTENBERGER.

El « Mia Malgranda Trott » tradukis el franca lingvo Fr. Schoofs.

TRAGEDIO

En ĉiu homa vivo okazas tragedio. En mia ankaŭ okazis tragedio, kiun mi deziras rakonti al vi. Tiu rakonto klarigos al vi kelkajn detalojn de mia vivo, kiuj eble al vi ŝajnis misteraj.

Car ni estas hodiaŭ en intima, eĉ familia rondo, mi deziras klarigi, kial mi atingis kvardek kvin jarojn, kaj tamen estas fraŭlo, maljuna fraŭlo jam, sufiĉe grizhara.

Vi poste ankaŭ komprenos, kiel mi, post mia dudek-tria jaro, neniam plu eniris kinejon, eĉ ne por vidi Charley en « Urbaj Lumoj » aŭ Chevalier en « Am-parado ».

Vi komprenos, kial mi ne plu iris al la maro dum la libertempo, eĉ ne dum la tiel varmego somero de la nuna jaro.

Mi estis tiam dudek-tri jara. Okazis antaŭ 22 jaroj.

Iun vesperon, mi adiaŭis al mia amatino Minny. Estis je la fino de Julio, kaj mi intencis pasiĝi ĉe la marbordo, la dusemajnan libertempon, kiun mi ricevis.

« Kaj precipe, mi deziras, ke vi ne amindumu kun aliaj fraŭlinoj, dum via restado en Ostendo », diris Minny.

« Ho! ĉu vi ne jam konas min », estis mia respondo. Tio vere indignis min. « Vi ja tre bone scias », mi diris, « kion mi promesis al vi, kaj krom ĉio, mi ne konatiĝas tuj kun ĉiu ĉu, kiun mi rekontas. »

Tio sonis tre fanfarona, sed feliĉe, mia Minny ne estis kritikema iun vesperon. Si donacis al mi skatolon kun kvindekdaŭna bonaj « Turmak » cigaredoj, ĉar ŝi estis la filino de tabakvendisto. Ni ne estis jam fianĉigitaj, sed tamen, mia patrino jam vidis Minjon, kaj ŝi estis dirinta: « Minny estas vere tre ĉarma knabino ». Tial ni estis trankvilaj kaj certaj, ke iam ĉio estos aranĝita. Do ni kortuŝe adiaŭis.

La tuta mondo ŝajnis glora, kiam en la unuaj tagoj, mi promenis tien kaj reen sur la bela digo. Mia flanela pantalono estis ĉiam senmakula. Vespere, mi metis la bluan maristan veston kun blanka marista ĉapeto laŭ la tiama modo. Ĉiam mi faris ege bonan impreson, tion mi bezonas ja rakonti mi mem, ĉar alie vi ĝin nescius. Pardonu do, al mi, kiam mi diras, ke brilaj okuloj jetis al mi fajrajn rigardojn, kiam mi pasis. Sed mi estis netrafebla. La adiaŭo de Minny sonis ankoraŭ en miaj oreloj, kaj ŝiaj cigaredoj ne jam estis fumitaj. Tial la fajro de l'amo ankoraŭ arde brulis.

Kelkaj tagoj pasis kaj mi tre amuzis min. Ĉiumatene mi skribis ĉarman leteron al mia kara Minny. Tamen, je la tria tago, skribinte la matenleteron, mi honte devis konfesi, ke ĝi estis multe pli mallonga ol la du antaŭaj. Mi trovis tamen facilan senkulpigon ĉar la freŝa bano min atendis kaj tio estis ĝis nun mia plej granda plezuro. La vetero estis brile bela kaj mi vere ŝentis paradizan ĝuon, naĝante tien kaj reen, kaj poste flosante laŭvole de la dancantaj, supren kaj suben fluantaj ondoj.

Post tiu ĉiela bano, mi ripozis sur benko, rigardante la ludantajn infanojn sur la sablo, kaj la promenantojn sur la digo. Mi tamen sentis min iom sola. Mi faris kelkajn konatojn en la hotelo, sed ili estis tro elspezemaj laŭ mia plaĉo. Ili kutimis aranĝi aŭtoekskursojn al Bruĝo, al Yper, Nieuwpoort, Zeeland, k.t.p. Mia budĝeto ne permesis min, partopreni en tiuj elspezigaj ekskursoj kaj tial mi restis sola. Vere, tiu soleco estis iom malgaja, kaj mi tre bedaŭris tiumomente ne havi mian Minjon apud mi.

Meze de tiu soleca revo, subite iu ektuŝis mian ŝultron, kaj rigardante, mi ekvidis mian amikon Robert kun ĉarma tiel aminda fraŭlino, ke mia sango unu momenton haltis en sia fluado.

Ŝi supozeble rimarkis la impreson kaj ridetis ĝentile; tio redonis al mi ŝajnan trankvilecon, kvankam interne mi pli kaj pli konfuziĝis.

«Nu, Albert, li diris gaje, tiel sole. Permesu, ke mi prezentu vin al mia kuzino, fraŭlino Flory Roze. Mia onklo deziras, ke mi faru kelkajn aĉetojn en la urbo, kaj vere mi ne volas ĉien rapidi kun Flory nun kiam estas tiel varmege. Faru al mi plezuron, kaj estu eskorto al mia kuzino ĝis mi revenos.»

Nova rigardo el la profundaj bluaj okuloj de Flory haltigis miajn pulsojn, kaj mi murmuris ion ĝentilan al Robert, dum li forkuris.

La tempo forflugis, kaj la ĉarma delikat-ruĝa golfo kaj stranga long-lana blua kufo tute ensorĉis min. Tial mi ĝojis, ke Albert restis for tiel longtempe ĉar la tago sangiĝis en krepusko, la krepusko en malhelo kaj tamen Albert estis nevidebla.

Finfine, je la deka, li ekaperis senspira kaj pardon-petante. «Mia onklo ne lasis min trankvila dum la tuta tago, tiel li senkulpigis sin. Li devigis min kuri tien kaj reen, kaj mi estas kontenta, ke mi alvenis sufiĉe frue ankoraŭ por akompani vin hejmen.»

Ni alvenis ĉe la hejmo kaj post kiam Flory estis enirinta Robert diris: «Gracia ĉarma knabino, ĉu ne?»

«Je-es, mi konsentis; krom tio, ŝi havas admirindan apetiton. Mi manĝis bananojn, glaci-kremon, pasteĉojn kaj ŝi ankoraŭ aludis pri ostroj. Ĝis mi diris, ke ostroj estas manĝataj nur en monatoj en kies nomo troviĝas la litero «ro».

Robert klarigis tion. «Estas la aero, li diris, ĉar en la urbo ŝi preskaŭ nenion manĝas. Sed tie ĉi ŝi manĝas admirinde. Tiurilate estas vera plezuro por ekskursi kun ŝi». — Kontraŭ tio, mia monujo energie protestis.

«Ĉu mi vidos vin morgaŭ matene», Robert daŭrigis?

Mi balbutis konsenton malgraŭ mi mem. Verdire mi ĵus promesis interne ne plu revidi Flory, sed...

Ŝajnis al mi, la sekvantan matenon, ke la letero al mia Minjo ne estis tiel aminda kiel kutime.

Sed verŝajne, la profundaj bluaj okuloj de Flory estis pli kulpaj ol mi tiam volis konfesi.

Ciukaze mi trovis min mem, mirantan pro mia propra senhonteco kiam mi proponis al Flory ekskurson al Blankenberghe per la tramo.

Ŝi jesis tre kokete. Estis multego da vojaĝantoj sur la antaŭ-plataĵo. Por malhelpi, ke Flory falu el la veturilo, mi delikate metis la brakon ĉirkaŭ ŝian talion, kaj ni forveturis...

O! Perfidulo.

La resto de la Libertempo pasis rapide, tro rapide laŭ mia plaĉo.

Mi revenis en la urbon, kaj en mi du bildoj militis por la unua rango: Flory kaj Minny.

Minny eble trovis min ŝangita, tamen ŝi nenion diris pri tio.

Mi estis skribinta amindan leteron al Flory, sed ricevis neniun respondon. La tempo denove rapide forflugis kaj ĉi ĉio faris, ke la glora lumo de la mar-idilio iom post iom paliĝis.

Mi denove aĉetis «Turmak» cigaredojn ĉe Minjo, kaj ni vidis unu la alian kiel antaŭe. Iun vesperon, mi renkontis Minjon ĉe la rendevuo. Estis pluva vetero. Mi do proponis iri al la «Lum-Palaco» por pasigi la vesperon.

Oni donis kiel ĉiam komikan kaj emociigan filmojn. Oni ankaŭ donis la Aktualajojn. Aperis sur la tuko filmo kun la titolo «Somera plezuro en Ostendo».

«O kia feliĉo, ekkriis Minjo, nun mi vidos ankaŭ kiel Ostendo vere aspektas. Mi neniam estis tie.»

Mi ankaŭ rigardis kun plezuro. Sur la tuko aperis io tre konata, rememoriga. Mi rekonis la belan digon, la banejon, la densan popolamason, la tramojn kaj aŭtomobilojn rapidantajn tra la stratoj. Kaj subite, o teruro, mi stoniĝis, mi vidis la tramon al Blankenberghe. Mi vidis Flory kaj min men trapasantajn la amason kaj malfacile lokprenantajn sur la plataĵon. Mi vidis min mem protektantan Flory kontraŭ ebla elfalo. La tramo forveturis, mi rigardis, vidis, kaj trovis, ke tio certe necesigas kelkajn klarigojn al Minjo. Mi turnis min al ŝi, sed ŝi ankaŭ estis vindinta ĉion kaj ŝia seĝo estis ne plu okupita.

Tio estas mia rakonto. Mi esperas, ke la junaj amikoj trovu lecionon en tiuj konfidencoj.

Ili nun scias, kial mi ne edziĝis, neniam plu iris en kinejon nek al la maro. Ke ili profitu el mia malfeliĉo.

M. DE KETELAERE.

Amerikana cirkulero

Mortis la 11an de nuna monato, en sia magazeno, N-ro 20 Greenwich strato, S-ro Edward Jones, tre respektita de ĉiuj kiuj konis lin, kaj faris komercaferojn kun li. Kiel homo li estis aminda, kiel estro, honesta kaj modera. Liaj virtoj superis ĉion kaj liaj kastorĉapeloj kostis nur tri dolarojn. Li lasis vidvinon por plori sian perdon kaj grandan provizon, vendotan malkare por la profito de sia familio. Li estis tirita al la alia mondo en la bela periodo de vivo, ĵus kiam li estis farinta grandan aĉeto de felto, kiun li aĉetis tiel malkare, ke lia vidvino povas liveri feltoĉapelojn pli malkare ol iu alia magazeno de la urbo. Lia nekonsolebla familio daŭrigos la komercon kun akurateco.

(Tradukis el Angla lingvo) P. ROGIER.

BONHUMORO

NOVJARO. — *La drinkulo*: Mi ebriiĝis pro amo al mia familio: mi trinkis unu litron da vino je la sano de ĉiu el miaj infanoj... kaj mi havas dektri.

NOVA KUIRISTINO. — La nova kuiristino ŝatas esti tute bonmaniera.

— Ĉu mi devas anonci: « La tagmanĝo estas servita » aŭ « La tagmanĝo estas preta »?

— Nu! respondas al ŝi la mastrino, se estas same kiel hieraŭ, vi povos anonci: « La tagmanĝo estas malsukcesinta ».

SALONAJO. — Ŝi estas tre sprita, sed kiel malbona!

— Ho! ne grave, estas tiom da malbonuloj, kiuj tute ne havas spriton!

ANTAŬ TRIBUNALO. — *La prezidanto*: Kulpigito, ĉu vi estas adziĝinta? *La kulpigito*, tute aminde: Lia Prezidanta Moŝto eble havas filinon?

CERTA RIMEDO. — Mi ĵus renkontis vian nevon: kia netolerebla estaĵo!

— Tute prave. Feliĉe, min li ne plu vizitas.

— Kiel vi sukcesis akiri tiun rezulton?

— Plej simple. Mi pruntedonis al li kvincent frankojn, dirante al li, redoni ilin la unuan fojon kiam li revenos...

PLI GRAVA. — *Politikisto*: Tiuj gazetoj rakontas abomenindaj mensogoj pri mia persono.

Amiko: Ili estus povintaj fari pli grave.

Politikisto: Ankoraŭ pli grave! kiel do?

Amiko: Ili estus povintaj skribi la veron.

TAŬGAJ ATESTANTOJ. — Laktvendisto kaj lia edzino aperas antaŭ la tribunalo, ĉar ili estas kulpigitaj pri akvumado de sia lakto. Ili pretendas, ke tiu akvumado okazis nesciate de ili: Estas niaj infanoj, kiuj enverŝis akvon, ludante.

Oni venigas la infanojn (4 kaj 5 jaraj), kiuj konfirmas la deklaron.

— Kion vi ludis? demandas la juĝisto.

— Ni ludis « patro-kaj-patrino », tuj respondis la buboj.

Hispana kamparano, revenis el Francujo, kie li partoprenis la rikolton de la vinberoj. Liaj samvilaĝanoj petis al li multajn detalojn:

— Kion vi vidis plej strangan tie?

— Ho, li respondis, ion eksterordinaran: eĉ la plej juna infaneto parolas france kun granda lerteco, dum mi, kvankam mi faris mian eblon, apenaŭ sukcesis lerni kelkajn vortojn.

— Kiel vi nomiĝas, knabeto?

— Kiel mia patro, Sinjoro.

— Kaj kiel do nomiĝas via patro?

— Nu... kiel mi.

— Vi ne komprenas min: kiam via patrino vokas vin, kion ŝi diras?

— Ŝi krias: « Venu tien ĉi, bubo! »

ESPERANTO-RADIO-PROGRAMO

kompilita de Internacia Radio-Servo, komisiita de I.C.K.

Adreso: Joh. JUNGFER, Lindenstr. 10, Lübben (Spreewald), Germanujo

Mallongigoj: *Dimanĉo*: D; *Lundo*: L; *Mardo*: M; *Merkredo*: Mk; *Ĵaŭdo*: J; *Vendredo*: V; *Sabato*: S; *ĉian duan Mk*: 2.Mk; *neregule, nekonata aŭ necerte*: n.

Pri temo, sendhoro, ondlongo kaj aliaj detalaĵoj donas informojn la naciaj Radio-gazetoj kaj « Heroldo de Esperanto ».

Radio-paroladoj en Esperanto: Breslau: V; Freiburg: 2.Mk; Gleiwitz: V; Graz: J; Huizen: 2.S; Harkov: n.; Kaunas: J; Innsbrück: J; Klagenfurt: J; Le Havre: 2.V; Leningrad: 2-9-12-19-22 kaj 29 ĉiumonate; Lille P.T.T. Nord: D; Limoges: n; Linz: J; Lyon-la-Doua: S; Minsk: n; Moskvo: n; Motala: 4.D; Odessa: n; Salzburg: J; Stockholm kaj relajsoj: 4.D; Strasburgo: n; Stuttgart: 2.Mk; Tallinn: M; Tartu: M; Wien: J; Zagreb: 2.S.

Resumo pri la semajna programo en Esperanto: Danzig: S; Freiburg: V; Heilsberg: S; Königsberg: S; Stuttgart: V.

Esperanto-kursoj per Radio: Aachen: D; Dresden: D; Geneve: J; Harkov: n; Huizen: S; Köln: D; Langenberg: D; Le Havre: 2.V; Leipzig: D; Lille P.T.T. Nord: D; Münster: D; Paris P.T.T.: J; Hilversum: D; Lausanne: J; Sottens: J.

Aŭskultu la Esperanto-dissendojn! Skribu al la Radio-sendstacioj!

DIVERSAJ INFORMOJ

« LA KOMERCO » estas la titolo de la Oficiala Bulteno de Komercista Esperanto-Unio, kiu havas sian sidejon en Dresden-Radebeul, Friedrich-Auguststrasse 4. Tiu eldonaĵo aperigis sian 16an numeron antaŭ kelkaj semajnoj. Ni rekomendas al la komercistoj-esperantistoj, kiuj ne konas tiun publikaĵon, peti specimenon ĉe la suprecitita adreso.

RADIO-KUNVENO ĉe la proksima universala kongreso de Esperanto estas projektata de la Internacia Radio-Servo. Verŝajne tiu kunsido estos gvidata de S-ro H. Favrel, kiu ĵus estas elektita kiel Prezidanto de la Radio-Komisiono por la universala kongreso. Detalaĵoj sekvos.

DEZIRAS KORESPONDI: Juna pola esperantisto kun ĉiuj landoj, per ilustritaj poŝtkartoj. Salomon Wajnberg, R. Kosciuszki n. 29, Białystok (Polujo).

BIBLIOGRAFIO

Verkoj, de kiuj ni ricevas unu ekzempleron, estas citataj sub ĉi tiu rubriko. De tiuj, kiujn ni ricevas duekzemple, ni publikigas recenzon.

Ĉiuj verkoj estas haveblaj ĉe Belga Esperanto-Instituto, Antverpeno, Kleine Hondstraat, 11, rue du Petit Chien; poŝtĉeko n° 1689.58.

KOMPATINDA KLEM, de John Merchant. — 96 paĝoj, 18,5x12,5 cm. Eld. 1931: The Esperanto Publishing Co Ltd., Londono W.C. 1. Pr.: Fr. 9,75.

Klem estas la malzorgata filo de S-ro Kensford. Lia kulpo estas ke li naskiĝis knabo kaj ne knabino. Pro tio li suferis kaj suferis senfine dum sia infaneco. Kiel ĉiuj infanoj, kiuj ne ĝuas la amon kaj zorgadon de siaj gepatroj, Klem havas specialajn virtojn: laboremon, bonecon, justecon, ktp., kiuj igis lin escepte simpatia. Kiel ili, Klem havas ankaŭ kelkajn ŝancojn en la vivo, kiujn ni ĉiuj vane atendas de la sorto, sed li havas aparte grandan feliĉon: ke, lerninte Esperanton, li povas entrepreni kongresvojaĝon kun S-ro Merchant, kiu estas certe la plej gaja kongresano en la mondo. Ni rekomendas la legadon de tiu bona libro, ankaŭ al la komencantoj, ĉar la lingvo estas simpla kaj flua. Agrablan tempon oni havos sekvante la «heroon» de la libro tra lia vivo, kies pordon fermas la aŭtoro, kiam ekaperas ĉe la horizonto la roze bela estonta feliĉo en la persono de F-ino Browning.

LA VOJO RETURNE de Erich Maria Remarque. Eldonejo «Heroldo de Esperanto» 370 paĝoj. 21x14 cm. Prezo: Fr. 51,—.

Jen denove interesa eldono de «Heroldo de Esperanto». Interesa jam pro tio, ke multe helpas al la disvastigo de Esperanto kaj al la komprenigo de la utileco de nia lingvo, la fakto, ke la monde konataj kaj aktualaj libroj ankaŭ aperas en Esperanto, preskaŭ aŭ tute sammomente kun la alilingvaj eldonoj. Tio jam okazis kun la Libro pri la Polusveturo de Andreo; kun la unua verko de Erich Maria Remarque «En Okcidento nenio nova». Tio ree okazas per apero de «La Vojo Returne»; kies titolo estis antaŭ malmultaj monatoj sur ĉies lipoj, kaj kiujn multege da militintoj deziris legi. La unua libro de Remarque estis libro de la milito, ĝi intencis montri la veran vizaĝon de la milito, kaj ĝian terurecon ne nur laŭ materia korpa vidpunkto, sed precipe, laŭ anima kaj spirita vidpunkto.

«La Vojo returne» nin kondukas en pli serenajn sferojn. Ĝi vere intencas igi la Libro de la Paco.

Cu Remarque post kelkaj jardekoj estos ankoraŭ konsiderata kiel granda universala verkisto? Ni dubas pri tio, precipe post lia dua verko. Post legado de tiu bela traduko de lia dua libro, ni bedaŭras ke li ne kontentigis je la titolo de plej ĝenerale konata milit-literaturisto, kiun li certe estis akirinta. «La Vojo Returne» estas leginda, ne nur ĉar persono moderna deziras legi ĉion, kio aperas, kiel tiu ĉi libro, en la internacia eldona fako, sed ankaŭ ĉar ĝi estas same vige, same vivplene skribita kiel la unua. Ni nur konsideras ke ĝi nenion aldonas al la gloro de la aŭtoro, kaj ni timas, ke se li nepre intencas daŭrigi en tiu speciala laborfako, Remarque baldaŭ ne plu estos legata kaj fuŝos sian propran aferon, post la plej grandioza eldonplano, kiun iam eldonisto verkis por aŭtoro. Sed kun tiu rimarko, «La Vojo returne» tamen restas verko, kiun ĉiu libramatoro devas nepre posedi en sia libroŝranko.

GAJAJ VESPEROJ de C. Walter. 80 Paĝoj 17x12 cm. Eldono de la aŭtoro mem: Hohenzollernstr. 11, Berlin W.10. Prezo Rmk. 1,—.

Tiu dua libro de C. Walter enhavas grandan kolekton de spritaĵoj, anekdotoj, humoraĵoj, diversaĵoj. Krom tio estas en ĝi legindaj kaj sekvindaj reguloj por gvidantoj de kursoj kaj kunvenoj kaj programkonsiloj por grupkunvenoj. Interesa estas ankaŭ la aparta ĉapitro pri Ludoj en la kunvenoj kaj en libera aero. La libreto estas zorge presita kaj eldonita. Ni rekomendas ĝin al ĉiu, kiu volas pasigi kelkajn agrablajn horojn.

BIALYSTOK. — Gvidfolio eldonita sub aŭspicioj de Bialystoka Magistrato kaj de la Turisma Servo de U.E.A. Ilustrita. Prilaboris J. Sapiro. 8 paĝoj 11x18 cm. Senpage ricevebla laŭ peto ĉe Bialystoka Magistrato.

VOCABOLARIO COMPLETO ESPERANTO-ITALIANO de Achille Tellini. 512 paĝoj 6x8,5 cm. Eldonis 1931: A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo). Prezo: L. it. 7; tole bindita L. it. 9,—.

Malgranda praktika vortaro, kiu faros grandajn servojn inter la italaj Esperantistoj. La materialo estas ampleksa kaj bone prezentita. Laŭdinda ideo estas, signi la oficiale aprobitajn radikojn, ĉar ĝi efike gvidas precipe la novajn samideanojn. La formato de la libreto estas tre oportuna, precipe tiu de la tolbindita eldono.

THE NORTH AMERICAN ESPERANTO ALMANAC 1931 (E.A.N.A. Libraro n-ro 4). — Edited by J. J. Susmuth. Published by The Esperanto Association of North America, Fort Lee, N. J. (Usono). 176 paĝoj 15x10,5 cm. Prez.: Dol. 0,50.

Enhavas adresaron de la Nord-Amerika Esperanto-Societo kaj diversajn artikolojn pri la historio kaj progresado de Esperanto. Krom tio estas en la libro pli grande presita eldono de la angla ŝlosilo de Esperanto kaj katalogo de niaj plej bonaj eldonaĵoj.

LANDO DE ARGENTA AKVO (E.A.N.A. Libraro n° 5). — Rakonto el la Okcidento de Usono de Virgie E. Roe, tradukita de Edward S. Payson, honora Prezidanto de la Esperanto Asocio de Nord-Ameriko. 48 paĝoj 15x10 cm. Eldonis: Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, Fort Lee, N.J. (Usono). Prezo Dol. 0,25.

Tiu rakonto pentras la vivon de la «edukita» gento de la iame sovaĝaj Navajoj loĝantaj en la usonaj ŝtatoj Nov-Meksiko kaj Arizono, la vivon de la raso kaj la kulturon de la blankulo, la vivon de civilizo kaj la dezerton. Pri la traduka laboro garantias la nomo de la tradukinto.

THE BIRTH OF ESPERANTO — LA DEVENO DE ESPERANTO (E.A.N.A. Libraro n° 6). — Eltiro el Letero de L.L. Zamenhof. Tradukita de Henry Hetzel. 24 paĝoj 15x10 cm. Eldonis Esperanto Association of North America, Fort Lee, N. J. Prezo: Dol. 0,10.

Reeldono kun traduko en angla lingvo de la historia letero de la kreinto de Esperanto al N. Borovko.

AMERICAN ESPERANTO KEY (E.A.N.A. Libraro n° 7) by J. J. Susmuth. 48 paĝoj 15x10 cm. Published by The Esperanto Association of North America, Fort Lee, N. J. Prezo: Dol. 0,10.

Bele presita, grandformata eldono de la anglalingva ŝlosilo de Esperanto. La nova libreto sendube multe helpas la propagandon por Esperanto en Nord-Ameriko.

UKRAINA SLOSILO DE ESPERANTO. — 32 paĝoj 11x7 1/2 cm. Eldonita laŭ la lasttempe akceptitaj normoj de Internacia Centra Komitato.

ESPERANTO EN ZIJN VERBREIDING door Liem Tjong Hie, met een voorwoord van J.H.A. Sens. 68 paĝoj 17x11 cm. Eldonis: 1931, Esperanto-Bureau en Instituut «Liem Tjong Hie», Semarang, Java. Prezo: Ned. Guld. 1,—.

La broŝuro pritraktas la praktikajn progresojn, kiujn Esperanto faris en la diversaj fakoj de la homa vivo: Ligo de Nacioj, lernejoj, Ruĝa Kruco, Komerco kaj Industrio, Foiroj, turismo, telegrafo, radio, parolanta filmo, poŝto, scienco kaj tekniko, literaturo. — La citita materialo estas agrable prezentita kaj tre certe la apero de tiu libreto estas la signo de antaŭenpuŝo de nia movado en tiu malproksima regiono. Ni gratulas la kuraĝan propagandiston S-ron Liem Tjong Hie al kiu ni deziras fruktoričan rikolton.

KELKAJ PROZAJ KAJ POEZIAJ PERLOJ. — El diversaj lingvoj tradukitaj de L. Cogen. Skribitaj en Stenografio Duployé-Flageul. Kun originalaj desegnaĵoj de Ach. Demaertelaere-Bentos. 16 Paĝoj 16x11 cm. Eldonis: 1931, Esperanta Stenografio, 9 Boulev. Voltaire, Issy-les-Moulineaux (Francujo). Prezo: Fr. 1,50.

Rekomendita al la Esperantistoj, uzantaj la stenografion Duployé-Flageul, metodo jam de longe konata inter niaj samideanoj.

B.E.S.-a ADRESARO de Esperantistoj el ĉiuj landoj, 9a eldono 1931. 100 paĝoj 15x11 1/2 cm. Eldonita de Bohema Esperanto-Servo, Potštejn, Ĉeĥoslovakujo. Prezo: Svisa fr. 1,—.

La adresaro estas kolekto de nomoj kun adresoj de korespondemuloj kun la indiko de la koncerna branĉo por ĉiu el ili. La fakto, ke la eldonaĵo atingis sian okan reaperon ŝajnas montri, ke ĝi havas fidelan interesularon, al kiu ĝi faras servojn praktikajn.

GAJAJ HOROJ POR ESPERANTISTOJ, de C. Walter. 56 Paĝoj 15x11,5 cm. Tria eldono de la aŭtoro mem: Hohenzollernstr. 11, Berlino W.10. Prezo: Rmk. 0,55.

Ampleksa kolekto de spritaĵoj, anekdotoj, ŝercdemandoj, preseraroj, vortludoj, societludoj por gajigi grupojn, izolulojn, kursgvidantojn, lernantojn. — La aŭtoro kompilis la libreton por ke la gesamideanoj estu gajaj! Ni rekomendas ĝin al ĉiuj legantoj, kiuj volus provi, ĉu li sukcesis.

ADRESLIBRO DE POLLANDAJ ESPERANTISTOJ kaj «Praktika Informilo Pri-Esperanta». — Prilaboris Jan Zawada. 208 paĝoj 20x14 cm. Eldono de l'Aŭtoro 1931. Biblioteka Pracy Esperanckiej Tom II. Varsovo. Prezo: So. Fr. 3,— plus 10 % por aŭfranko.

GYSBRECHT VAN AEMSTEL. — La Detruo de lia Urbo kaj lia Ekzilo de Joost Van den Vondel. Tragedio. La Antikva Urbo Pereas. El la nederlanda originalo tradukis Ir. J.R.G. Isbrücker. Kun bela aŭtorportreto. 80 paĝoj 22x15. Eldonis 1932 W. J. Thieme & Cie, Zutphen. Prezo broŝ. Ned. Fl. 1,95; bindita Fl.: 2,50.

SCIENCA FUNDAMENTA ESPERANTA TERMINARO. — Aldono al Internacia Scienca Asocio Esperantista Bulteno. Sekcio de Teknikaj Vortaroj. Eldonis Centra Presejo Esperantista, Parizo 1931. 24,5x16. 24 paĝoj. Prezo necitita.

MINIATYRATLAS över hela världen. — Alla jordens länder på 14 Kartblad. Eldonis 1931. Eld. Societo Esperanto Stockholm, Svedujo 16 paĝa teksto kun 14 landkartfolioj 11x9 cm. Prezo sved. kr. 0,35.

OVNINGSBOK till Elementärkurs i Esperanto (Ekzercada libro por elementa kurso en Esperanto). — Ellaborita de Sam. Jansson. Eldonis 1931. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm, Svedujo. 32 paĝoj 22x14,5 cm. Prezo: sved. kr. 0,50.

LA GRAMOFONA KURSO EN ESPERANTO de Reĝtoro S. Jansson. Eldonis 1931 Eld. Societo Esperanto, Stockholm, Svedujo. 20 paĝoj 23x15 cm.

VIAJ AMIKOJ LA LIBROJ. — Ilustrita Katalogo de Herolodo de Esperanto 1931/32 Brüsselerstr. 94 Köln Germanujo. 24 paĝa broŝuro 21x13,5.

KONVERSACIA GAZETO. — Gravaj kaj utilaj informoj por novaj Esperantistoj (Unua kaj lasta numero). Eldonis 1931 la Internacia Ĉeĥ-Instituto de Esperanto, Den Haag (Nederl.). 20 paĝoj 24,5x31,5. Prezo: fr. 3,—.

LA ENIGMOJ. — Granda Konkurso. 1000 premioj. 16 paĝa broŝureto eld. 1931 Internacia Ĉeĥ-Instituto de Esperanto Oostduinlaan, 32, Den Haag. 15,5x12 cm. Prezo nemontrita.

ZAMENHOF de Julius Glück. — Memor-Parolado en la «Esperanto-Gruparo Berlin», 2a eldono 1931 Max Haase Berlin S 14, Stallschreiberstr. 21. 8 paĝoj 22,5x15 cm. Prezo: Rm. 0,25 plus Rm. 0,05 por sendkosto.

KRESTOMATIO. — Simpla Legolibro de la Mondlingvo «Esperanto» kun klarigoj de H.J. Bulthuis L. K. Dua eldono 1932. Eldonis W. J. Thieme & Cie. Zutphen. 300 paĝoj 22x15 cm. Prezo Ned. Guld. 3,50. Bindita 4,25.

LA JUNA ROBINSONO. — Legolibro por infanoj. Enkondukanto al «Robinsono Kruso por Geknaboj». Kompilis H.J. Bulthuis L.K. Eldonis 1932 W. J. Thieme & Cie. Zutphen. 50 paĝoj 23,5x15,5 cm. Prezo: Ned. guld. 0,60.

ĈIUJ ESPERANTISTOJ

KAPVESTAS

sin ĉe

SAMIDEANO CAUS

Capeloj : ĉiuj markoj kaj prezoj

Kasketoj por vojaĝi

Ombreloj por Sinjorinoj kaj Sinjoroj

Firma fondita en 1898

Vondelstrato, 19, ANTVERPENO

Banque Générale de la Flandre Occidentale

Anonima Societo fondita en 1881

— BRUGO : 56, rue Flamande —

28 agentejoj en Flandrio kaj ĉe la marbordo.

FILIO DE LA

Société Générale de Belgique

Anonima Societo starigita laŭ Reĝa Dekreto de 28 Aŭgusto 1922

Kapitalo kaj rezervoj : Du Miliardoj da frankoj

Kun la filiigitaj bankoj en Belgujo : Tri Miliardoj 834 Miliono da Fr.

Mondeponoj je vido kaj je termo

KREDITMALFERMOJ — DISKONTADO — MONSANGO

BORS-OPERACIOJ — FINANCAJ INFORMOJ — MONKESTOJ

"mano de feino"
artefaritaj floroj
fantaziaĵoj
novaĵoj



deponejo:
vermandere
wetstr. 15-r. de la loi
antwerpeno.

tel. 500.06
esperanto-
entrepreno

Belga Manufakturo de Industriaj Produktoj

Societo anonima (Fondita en 1872)

18, Rue Neuve, 18 -- LEDEBERG-APUD-GENTO

Telegraf-Adreso: "PERFECTA" GENT

Telefono: 635


Dozitaj analiziloj por la uzado de la industriaj akvoj.

Logika purigo per purigaj aparatoj aŭ en kaldronejoj kun aŭ sen aparatoj.

Senpera importado de industriaj oleoj kaj graso.

Stupo. Kauĉuko. Klapoj. Rimenoj.

Kotonrestaĵoj por purigi maŝinojn.



BOLSIUS

**11, Korte Koepoortstr., 11
ANTVERPENO**

Firmo fondita en 1828

ĈIUJ MASTRUMAJ ILOJ

Daŭre brulantaj fornoj « JAN JAARSMA »
Kuirejaj fornoj HOMANN kaj KÜPPERBUSCH
Ĉiuspecaj Infanveturiloj

Lavmaŝinoj « JOHN »

Funkcias per gaso aŭ karbo



Membroj de Belga Ligo Esperantista ĝuas rabaton